# La Suda Kruco

## Organo de la Australiaj Esperantistoj

**Redakcio—Administracio:**

Box 1367, Elizabeth-st. P.O.
Melbourne (Australio).

**Abono (por dek du numeroj):**
**Australio: 3 shilingoj.**
**Ekster Australio: 3 sh. 9 p.**
**au 18 respondkuponoj.**

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 shilingo au 4 respondkuponoj.

**N-ro 1. Melburno (*Melbourne*), Australio. Julio, 1920**

"Aperas jen, modeste kaj ghentile,
"Estrino mia kun la gest'saluta,"
kantis Dante pri sia amatino; kaj tiel same "La Suda Kruco" aperas antau siaj legantoj. Ni penos per tiu chi malgranda gazeto servi al Esperanto kaj al la Esperantistaro, kaj helpi al la disvastigo de la verko de Zamenhof. Esperanto neniam staris tiel alte, kiel nun; neniam antaue la bezono de nia lingvo estis tiel forte sentata, kaj neniam antaue la homoj estis tiel pretaj akcepti kaj uzi ghin. La estonteco estas plena de esperoj. "La Suda Kruco" estas malgranda peno helpi al ilia realigo.

---

### LA TRIA KONGRESO

### SUKCESA KAJ UTILA KUNVENO.

La tria Australia kongreso de Esperanto okazis kun granda sukceso en Sidnejo (Sydney), la bela chefurbo de la provinco Nova Sud-Kimrio (New South Wales) en Pasko de 1920. La dato restos por ni chiam memorinda. Kongresanoj venis el chiuj provincoj de Australio, sufiche longe veturante (la veturado el Okcidenta Australio, ekzemple, bezonis preskau unu semajnon), kaj pli ol sesdek cheestis la malferman kunvenon en sabato, 3-a de aprilo. Malgrau ke Sidnejo estis plena de vizitantoj, pro libertempo, pro la chiujara agrikultura montrado, pro la alveno de fama generalo, pro sporto kaj aliaj kauzoj, nia relative malgranda kunveno altiris kontentigan atenton che la publiko kaj che la gazetoj. La kongreso rapide kaj bonefike laboris en siaj laboraj kunsidoj. La festoj (ili ja ne mankis!) estis plene ghuataj. La Esperanta lingvo estis multe kaj flue parolata. La verda standardo alte flugis, ne nur lau spirito sed ech lau litero. Esperanto iris antauen per grandaj pashoj. La Tria Kongreso plene sukcesis.

En Sabato, 3-a de Aprilo okazis la oficiala malfermo de la kongreso. Cheestis jam preskau chiuj kongresanoj krom la delegitoj el Tasmanio, kiuj alvenis dum la posttagmezo. La prezidanto de la Australia Esperanto-Asocio (sinjoro J. G. Pyke) deklaris la kongreson malfermita kaj proponis, ke sinjoro T. E. O'Donoghue (prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo) estu la kongresa prezidanto, kaj la propono estis unuanime akceptita. Oni nomis fraulinon Maud Helm protokola sekretario. La delegitoj de diversaj grupoj tiam salutis la kongreson kaj (pro modesteco?) parolis nur mallonge. Oni atendis la kuneston de Pola samideano, sinjoro Przybylski, kolego de doktoro Zamenhof, sed la prezidanto de la Sidneja Pola Societo (sinjoro Skoworonski) rapor-

tis kun bedauro, ke li estas malfruigita kaj ne povos cheesti. La kongreso bonvenigis fraulinon Henderson, membron de la grupo de Edinburgo (Skotlando). Oni legis salutan telegramon en Esperanto de la Brisbana grupo kaj salutajn leterojn el fraulino Fraser kaj sinjoro Mason Beatty, el Brisbano, kaj el sinjoro E. A. Pryke, el Barraba (N.S.-K.); kaj pli poste alvenis alia telegramo en Esperanto de sinjoro Drummond, el Melburno: "Al Tria Kongreso—plena sukceso. Kuraghe antauen!" Do Esperanto ja povas esti telegrafata. Post plenumo de chi tiuj formalaj aferoj, la kunsido estis prokrastita. Tiam oni festis!

Oni festis en la bela Zoologia Ghardeno che Taronga-parko, de kie ni havis charman vidon de la fama haveno kun mil kaj unu golfetoj, terkapoj jen dom-jen arbo-kovritaj kaj havenshipoj irantaj tien kaj reen sur la blua akvo ridanta en la sunlumo . . . kio tamen ne dauris, char ekpluvo pelis nin sub tegmenton. Tamen oni babiladis gaje kaj de tempo al tempo rigardis la bestojn en siaj kavernoj lau la moderna plano. Afisho anoncis: "Oni nutros leonojn kaj tigrojn je la kvara"; unu frivola samideano volis aldoni "kaj Esperantistojn", char je la kvara oni kunvenigis nin en bufedo por tetrinkado kaj plua babilado ghis la horo de la hejmeniro.

En la vespero la kongresanoj iris, lau speciala invito, al la kongreso de la China Nacia Partio, kiu en chi tiu jaro ankau kunvenis en Sidnejo. La prezidanto bonvenigis la Esperantistojn per kelke da afablaj vortoj, rememorigante, ke du-tri membroj de lia partio estas ankau membroj de la Sidneja Esperanto-grupo.

Poste la kongresa prezidanto (sinjoro O'Donoghue) parolis angle kaj sinjoro Hyde, el Melburno, parolis Esperante al la kunveno; la temo de ilia parolado estis esprimo de bonvolo al la Chinaj kunhomoj kaj espero pri la paca progresado de Chinio. Interese kaj tute ne tede estis por ni audi la parolojn en China lingvo de la Chinaj delegitoj, kaj rimarki, ke inter ili ekzistas tute sama diverseco de tipoj, kiel inter ni; se oni iam dubis pri la unueco de la homa raso, tio estis konvinka pruvo pri ghia vereco.

Dimanchon ni esploris la Botanikan Ghardenon kaj . . . babiladis. Lundon ni faris tre plezurigan tuttagan ekskurson sur la haveno per motorshipo kaj . . . babiladis. (La Esperantistoj estas babilema gento.) Kiuj neniam antaue esploris la havenon, nun havis bonan okazon vidi grandan parton el ghi laudetale. Tro mallonga estis la tago; tro rapide ghi pasis per parolado kun amikoj, kantado de la tre bonaj kantoj de la Sidneja grupo, kaj luncho sur agrabla insuleto, ghis la shipo kun du Esperantaj standardoj alte flugantaj revenis al la urbo.

Mardo estis serioza tago denove, okupita per labora kunsido de la kongreso. Pri la decidoj de la kongreso vi povas legi en la Angla parto de chi tiu numero; mi nur diros nun, ke interalie oni diskutis la tut-Australian organizadon de la esperantistoj, kaj esprimis deziron pri reformado de la regularo de Australia Esperanto-Asocio tiel, ke ree ekzistu la antaua Melburna Esperanto-Societo, kaj ke la centra organizacio estu komitato konsistanta el delegitoj de chiuj Australiaj grupoj. La kongreso nomis sinjoron P. T. B. Hudson, el Melburno, delegito al la 12-a Internacia Kongreso de Esperanto en Hago, kaj salutis tiun kongreson kaj la 11-an Britan kongreson en Birmingham. Oni ankau deziris ke la proksima Australia kongreso havu lokon en Hobarto, chefurbo de la insula provinco Tasmanio je oportuna tempo. Sinjoro A. R. Cohen, el Melburno, legis faktorichan tezon pri "Esperanto kaj Komerco."

En la vespero de mardo estis agrabla koncerto tute en Esperanto kaj prezento de Esperanta komedio. La komedio estis "La Amigilo," originala verko de sinjoro J. G. Pyke, jam ludita ankau alilande. Ghi temas pri la chion venkanta amo . . . kaj Esperanto. Junulo mortas de amo al sia amatino; orfa junulino mortas de amo al sia amato. Ruza zorgantino de la junulino imagas, ke ili amas unu la alian, kaj ne aprobante tian amon, penas edzigi shin al dua junulo, ankau videble tre amanta. Sed ho ve, la vanteco de la homaj deziroj! Chiu el ili tri amas sian ali-landan korespondanton (ekkonitan per Esperanto, komprenehle), kaj ne iun en la sama

lando au ech kontinento. La kurteno falas do dum chiuj tri rigardas ameme, sopire, plenanime la portreton de Finno, Hispanino kaj Bohemino. La komedion oni bone ludis, kaj kelkaj vizitantoj estis frapitaj de la rapida kompreno che la audantaro kaj la beleco de nia lingvo.

Sekvis plua ekskursado kaj festoj; Sidnejo chiam abunde ilin liveras. La brila balo en la urbodomo, kiun partoprenis aro da samideanoj en diverslandaj kostumoj, por reprezenti la internaciecon de Esperanto, en la cheesto de la general-gubernatoro de Australio, la gubernatoro de Nova Sud-Kimrio, generalo Birdwood kaj aliaj eminentuloj . . . kiel priskribi ghin? La Esperantistoj estis nur unu aro el multaj, sed tre frapanta aro, kiam ili parade iris, kondukate de la organizantino, sinjorino A. Withers, en bela simpla kostumo reprezentanta Esperanton mem, sekvata de Australio (en la malnovmoda kutima vestaro de "la knabeto el Manly," kiun la "Bulletin" chiam prezentas); Manchuro, Mongolo, Bavaro, Svedo, Hispanino, Mauro kaj mi ne scias, kiom da aliaj. La tuta balo estis gaja spektaklo kaj (ho, profitamaj Esperantistoj) utila okazo por reklami Esperanton che la "alta mondo." Gaja ghi estis kaj multe ghuata; kaj ne malplej gaja je la horo de foriro, kiam Provencino kisis Bavarinon "Ghis morgau!" kaj eniris fiakron kun Finna sinjorino, Rusa fraulino kaj Hungara knabino, por dormeme rulighi hejmen; dume la alta Mauro en flirtanta burnuso el rugho kaj verdo ekmarshis hejmen tra la frumatenaj stratoj kun fidela ombrelo kaj palto de tre Europa modo.

Sekvis pli kvieta sed ne malpli ghuata vespero, kiam la Sidneja Esperanto-Societo akceptis la kongresanojn en sia tre komforta kunvenejo. Per bona programo oni regalis nin; chiuj numeroj estis bonaj. Pri la aliaj kunvenoj kaj festoj mi volus rakonti, kaj pri mil kaj unu aferoj gravaj au negravaj, propagandaj au simple festaj, kiuj okupis nin ghis la fatala horo, kiam ni devis ekiri hejmen kaj forlasi la urbon de la Tria Kongreso. Pri chio chi mi volus paroli, sed . . . mia spaco venas al fino. Restas diri nur unu vorton: **Dankon, Sidnejo!**

Al la sindonaj organiz antoj de la Tria Kongreso, al chiuj, kies klopodoj provizis tiel sukcesan kongreson kaj plezuroplenan feston: Dankon, kaj ree dankon!

Ni kune laboris harmonie por Esperanto; ni kune festis feliche; ni konighis kun afablaj samideanoj; kaj regis nin chiujn la spirito de la Esperantismo.

Dankon, Sidnejo!
Ghis revido en Hobarto!

A. DELSUDO.

:o:

## LA KONGRESO KAJ LA PUBLIKO.

La verdaj standardoj, kiujn ni kiom eble elmontris dum la kongreso, estis bona reklamo por Esperanto, kaj kauzis multe da demandoj.

La tagaj kaj semajnaj gazetoj dedichis kontentigan spacon al ni, kaj favore raportis, kun unu escepto, la "Sunday Times," kiu iom mokis nin. La "Sydney Mail" presis bonan bildon de la kongresanoj, sed aldonis la jam malofte audatan eraron, ke la Esperantistoj deziras anstatauigi la naturajn lingvojn per Esperanto, kaj la gazeto ech ne estis malfavora al tio!

Du kinema.-firmoj fotografis nin por siaj "gazetoj", kaj ni poste vidis nin en kelkaj teatroj de Sidnejo kaj aliaj chefurboj. Estas tre interese vidi sin mem sur la ekrano! Char la adreso de la sekretario aperis en la titoloj de la filmoj, tio estis efika propagandilo. Kopio de unu filmo estas sendita al Hago por edifi la anojn de la 12-a Internacia Kongreso.

:o:

## LA ORGANIZANTOJ DE LA TRIA.

La sekvantaj estis la komitato de la Tria Australia Kongreso de Esperanto: Sinjoroj T. E. O'Donoghue (prezidanto), G. H. Chappel, D. Maclardy, M. Miller, J. Joliffe, L. E. Pfahl (sekretario), kaj F. T. Simon (kasisto).

:o:

He was convinced that people who thought and spoke in a common language could not have the same feelings of hostility as people with different languages.—Professor Meredith Atkinson.



*Fotografita de Sidney Riley.*

LA TRIA AUSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO, SIDNEJO, PASKO, 1920.

ANTAUA VICO: F-ino E. Larcher, Melb., F-ino I. Corrigan, S-roj J. Joliffe, M. Miller, D. Maclardy, F-inoj. E. Lee, D. Corrigan, S-roj C. Bauer, F. Peters, Melb.

DUA VICO: S-ino A. M. Hogg, Adelajdo, S-roj M. Hyde kaj J. G. Pyke, Melb., T. E. O'Donoghue, prezidanto, R. R. Rawson, Melb., E. F. Heritage, Hobarto, S-ino M. Purnell, Melb., F-ino A. M. Hopton kaj S-ino A. W. Cohen, Melb.

TRIA VICO: S-ro W. Kidd, Brisbano, F-inoj Wilson, Fitzgerald, S-ro F. T. Simon, kasis'o, F-ino A. Godfrey, Melb., S-roj D. Guilbert, Hobarto, L. E. Pfahl, sekretario, F-ino Maud Helm. Melb., S-roj H, Leighton, Perth, C. Kidd, Brisbano, S-ino Richards, F-ino Ethel Ely, Melb.

KVARA VICO: S-ro A. W. Cohen, Melb., F-inoj M. Holdensen, Ida Ghent, kaj E. Godfrey, Melb., S-ino A. Withers, S-ino R. B. Bigelow, Melb., S-ro J. L. Parker, Melb., S-ino Thomson, F-inoj Emilie Ely, kaj T, Holdensen, Melb., S-roj W. C, Chambers, H. V. Tilbury, Melb.

POSTA VICO: S-roj G. G. Hussey, Melb., H. R. Smith, Ipswich, kaj A. R. Cohen, Melb,

## DECISIONS OF THE CONGRESS.

The following are the principal decisions of the Third Australian Esperanto Congress:

Requesting the Australian Esperanto Association to appoint Mr. Percy T. B. Hudson official delegate to the 12th International Esperanto Congress at The Hague.

Inviting the Australian Esperanto Association at its next general meeting to consider the amendment of its constitution in accordance with the following principles: (a) that the members residing in Melbourne should again become members of a body similar to the Melbourne Esperanto Society, (b) that the central Australian body consist of a council of delegates from each group, and (c) that the decisions of the central body be not made until all the delegates have had the opportunity of expressing their views and of voting by post or by proxy.

Sending greetings and good wishes to the 12th congress at The Hague and to the 11th British Congress at Birmingham.

That the next congress be in Hobart at such time as can be arranged.

Offering assistance to the Sydney Chamber of Commerce in the event of its using Esperanto, and inviting attention to the action of the Chambers of London and Plymouth.

Appointing a committee to bring out an Australian Esperanto journal, and devoting any balance of congress funds to the journal.

Thanking "Stead's Review," Brisbane "Daily Standard" and "The Cumberland times" (whose proprietor, Mr. W. T. Ely, M.L.A., was present) for their generous support of Esperanto.

Congratulating Sydney Municipal Library on the good selection of Esperanto books on its shelves.

———:o:———

## THE MODERN LANGUAGES ASSOCIATION AND ESPERANTO.

During the congress in Sydney, the Modern Languages Association devoted an evening to the consideration of Esperanto. Mr. George Collingridge de Tourcey, one of the earliest Esperantists in the State, read to the meeting, which was held in the Education Department's building, an entertaining paper, and illustrated his points with many apt anecdotes from his own long experience of languages and linguists—or would-be linguists.

Members of the Association gave the matter a very favorable hearing, and by their subsequent questions, which were answered by several Esperantists present, showed much interest, and desire for further information. Testimony of the value of Esperanto in aducation was given by a member of the Association, who had had it taught in her school, and had found it of great help in the language studies of her people.

As a result of the meeting, members of the Association, which includes some of the leading teachers in Sydney, have given their support to Esperanto, and are making it a subject of study.

———:o:———

## THE DIRECTOR OF EDUCATION (N.S.W.) AND ESPERANTO.

A deputation of Esperantists from various States waited on the Director of Education for New South Wales (Mr. Peter Board), asking that (as has been done in other places) a class should be opened at a metropolitan school. Among the members of the deputation were two teachers from the Education Department.

Mr. Board listened sympathetically, and voluntarily expressed himself strongly in favor of Esperanto, saying that its ideals were similar to those of the League of Nations. He questioned the present commercial value of Esperanto, and agreed with a member of the deputation that here in Australia it was at least equal to that of French, which was taught in his Department. He promised to consider the request, and the Esperantists left with the feeling that the matter was in good hands. The Department's decision has not yet been communicated, a change of Ministry having presumably caused delay.

## LA PRINCO KAJ ESPERANTO.

La Princo de Kimrio (heredonto de la Trono), kiu nun vizitas Australion, bonvolis akcepti ekzempleron de "The Esperanto Guide," la Esperanta lernolibro de sinjoro Maurico Hyde el Melburno.

Lia reghida moshto ankau bonvolis akcepti ekzempleron de "Lilio", la romano originale verkita en Esperanto de fraulino Edith Alleyne Sinnotte el Mont Albert, prezidantino de la grupo "Espero."

———:o:———

## TUTMONDA GAZETKONGRESO.

Okazos en Sidnejo en Pasko de 1921 grava kongreso de gazetistoj el la tuta mondo. La celo de la kongreso estas diskuti chiujn aferojn, kiuj koncernas la eldonadon de gazetoj: verkado, presado, reklamoj, ilustrado, cenzuro, telegrafoj, legha situacio de jhurnalistoj, k t. p. Oni atendas, ke kongresanoj venos el chiuj landoj, ne nur el Europo sed ankau el Ameriko kaj la landoj Pacifikaj. La kongreso estas grave subtenata de la registaro de la provinco Nova Sud-Kimrio, kiu vidas en ghi favoran okazon por diskonigi Australion en la eksterlando kaj reklami ghian mineralan kaj agrikulturan richon.

La organizantoj de la kongreso konstatas la valorn de Esperanto por tia kunveno, kaj jam konsentis, ke la Esperanta gazetaro estu oficiale reprezentata. Plie, ili proponis, ke en la programo de la kongreso estu parolo pri la graveco kaj utileco de Esperanto, kaj tiun proponon la Esperantistoj de Sidnejo kompreneble volonte profitas. Kredeble la kongresa libro aperos inter aliaj lingvoj ankau en Esperanto.

**Al la Esperanta Gazetaro.**—Por ke la nombro de Esperantaj gazetoj oficiale reprezentataj che tiu kongreso estu kiom eble granda, oni petas vin: bonvolu skribi al la Australia Esperanto-Asocio, rajtigante la Asocion nomi delegiton por reprezenti vin che la kongreso, kaj ankau bonvolu sendi du-tri ekzemplerojn de via gazeto por propaganda ekspozicio. La adreso de la Asocio estas: Box 731, Elizabeth street P.O., Melbourne (Australio).

## PROFESSOR MEREDITH ATKINSON ON ESPERANTO.

A firm supporter of Esperanto is Professor Meredith Atkinson, professor of economics in the University of Melbourne. He has on several occasions publicly declared his support of the movement, and recently in Melbourne delivered a striking lecture entitled "Esperanto and International Politics," before a crowded audience, in the Independent Hall. Professor Atkinson is a well-known writer on economic and social subjects, and his adhesion is a notable gain to Esperanto.

More recently, while on a visit to Perth (W.A.), Professor Atkinson delivered another lecture on the place of Esperanto in international affairs, emphasising the value of the language as a means of removing misunderstanding and creating understanding between peoples separated by difference of language.

In the course of his speech, Professor Atkinson said that to him the case for Esperanto appeared so clear that he did not know a single argument against it which would carry weight with any reasonable person.

Esperantists did not claim that it would bring about international peace, but that it would be a great and very real factor in the creation of a better understanding between nations. Between those who did not speak or think in the same language there were tendencies to mutual hostility which it was very difficult to counteract. If the thoughts of one nation could readily be comprehended by all other nations, differences would largely disappear.

With Esperanto in general use, all that was precious in the history and literature of each nation would still be enshrined in its own language, but Esperanto would be the supplementary vehicle for the conveyance of the finest of its thought to other nations. In every field of human advancement the effect would be remarkable. It would immediately be possible to publish in Esperanto editions of all the literature of the world worth reprinting, and the fact that they would have a world-wide circulation would ensure

their issue at prices which would place them within the reach of everyone. At present some of the best scientific papers and journals in the world were practically closed books to the scientists of the British race, and to those of many other countries.

A very important effect would follow the adoption of Esperanto for all international congresses; and it would do away with the present necessity of having every speech translated into at least three languages, and the great inherent disadvantage of the delegates thinking and speaking in different languages. International conferences were becoming increasingly frequent and important, and the use of Esperanto would enable a much more complete interchange of opinion between delegates; it would prevent any misunderstandings, which with a babel of tongues were inevitable, and it would also be a stimulus to the creation of international sentiment.

Competent educational authorities had expressed the opinion that Esperanto should be the first "second language" taught to children, as it was of great assistance to them in learning other foreign languages. If it were adopted in the schools of the world, the rising generation would be capable of understanding the thought and of examining and profiting by the literature and speech of every other nation; and the effect of such a condition upon the movement for international peace would be incalculable.

In the present disturbed state of the world, one of the things most heeded by humanity was a common vehicle of speech, and Esperanto was ready to their hand for the purpose. The removal of international hostilities would be perfectly possible if they could get the nations of the world around a table to discuss their differences, and the use of Esperanto was so strong, concluded Professor Atkinson, and the need for it so tremendous, that its ultimate universal adoption was assured, and it was progressing toward that goal with increasing rapidity.

## HECTOR HODLER.

Unu el la pioniroj de Esperanto, unu el la pioniroj de ghia praktika aplikado, estas jhus forprenita al ni; Hector Hodler, fondinto kaj prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, mortis en Svisio, sia patrolando, je la agho de 33 jaroj. Pri lia merito ne estas bezone paroli. Chiu Esperentasto bone konas la netakseblajn servojn, kiujn fairs UEA al nia movado, kaj chiu legema Esperantisto jam legis en "Esperanto" kaj aliaj gazetoj ia artikolojn de lia plumo, en lia klara, kuraghiga, racia stilo. Lia portreto montras idealiston, revulon, sed li estis praktika revulo, kiu realigis siajn revojn. Lia monumento estas UEA.

————:o:————

## PROVITA KAJ PRUVITA.

Ni Australianoj loghas en la plej malproksima lando—veturo al Europo okupas 30 tagojn kaj al Ameriko 20 tagojn, kaj sur nia tuta teritorio estas parolata nur unu lingvo. Ni tial povas malofte veturi en la eksterlandon, kaj pro la sama kauzo la alilandanoj malofte vizitas nin. Estas notinde, do, kiam Australia Esperantisto pruvas per persona sperto la jam milfoje pruvitan utilecon de Esperanto al la vojaghanto.

Sinjoro Percy T. B. Hudson el Melburno, nun vizitanta Japanion, skribas entuziasme pri la granda helpo, kiun li ricevis dank' al Esperanto. La Japanaj samideanoj atendis lin che la shipo, akompanadis lin tra la urbo kaj gastame akceptis lin. "Kun grandega felicho," skribas sinjoro Hudson, "mi, vojaghante, jam trovis, ke Esperanto estas mirinda afero. . . . Mi jam benas la tagon, en kiu mi eklernis Esperanton, char per la helpo de la kara lingvo mi havis, havas kaj havos tre felichan vojaghadon."

————:o:————

The object of Esperanto was to provide a means of inter-communication between the peoples of the world, which would ultimately break down the feelings of suspicion and hatred between nations, and the misunderstandings which so often led to warfare.—Professor Meredith Atkinson.

## "THE ESPERANTO GUIDE."

### TRANSLATION OF THE EXERCISES.

Believing that it will be helpful to students of Esperanto, we shall publish in each number a translation of the English exercises in "The Esperanto Guide," the well-known text-book of our samideano Mr. Maurice Hyde. It should be noted that the Esperanto exercises in this book consist of the "Ekzercaro" of Dr. Zamenhof (part of the Fundamento of Esperanto) numbered as in Mr. A. E. Wackrill's Konkordanco.

**Exercises 1, 2, 3, 4 and 5.**—For these there is no English exercise for translation into Esperanto.

**Exercise 6.**—Kie estas la infano? La infano estas sur la tero. Matura homo ne ploras. Libro, plumo kaj krajono kushas sur la tablo. Jen (or: Jen estas) sana infano. La homo, kiun mi vidis, estas tajloro. La homo kiu vidis min, estas tajloro. La floro, kiun mi trovis, estas rozo. Jen (or: Jen estas) la libro, kiu apartenas al la tajloro. Teodoro jam ne estas infano.

**Exercise 7.**—Leonoj estas dangheraj. Donu al mi la manon. La tajloro parolis pri Teodoro. Restu kun mi. Kiu kuraghas resti kun leono? Ne parolu al la patro. Mi vidis infanon, kiu parolis al mi pri la libroj. La infano estas sana. La infanoj estas sanaj. Ne donu al la patro la plumon.

**Exercise 25.**—Mi ne povas kompreni, kial ili atakas lin. Mi ne povas kompreni, kial li estas atakata. Chu shi estas amata de siaj infanoj? Tion (or: Tiel) mi kredas, sed shi estis malamata de sia edzo. Chu tiu chi krucho estas lavita? Jes, sinjorino, mi lavis ghin hodiau matene. Kial tiu chi lernanto estas chiam punata? Char li neniam volas obei al siaj instruistoj (or obei siajn instruistojn). Iuj komercajhoj estas nur malofte achetataj, sed tiu chi estas chiam vendata. La ingheniero, kiu konstruis chi tiun palacon, mortis dum ghi estis konstruata; sed tiam nia domo estis jam konstruita. Chu estis varme au malvarme hierau? Li kaptis la birdon. La birdo estas kaptita de li, sekve ghi apartenas al li. De nun la shuldoj de chi tiu juna viro ne estos pagataj de lia patro. Diru (al li), ke li estu trankvila; chio, kion mi shuldas al li, estos pagita al li baldau. Lau la projekto la teatro devas esti konstruita post tri jaroj; sed ni chiuj pensas, ke ghi estos kvin jarojn konstruata. Tiu chi libro ne estus legata kun tia granda intereso, se ghi ne estus tiel lerte verkita. Orajho; ferajho; gravajho; kaptajho; chasajho; petolajho; estajho.

:o:

## LAU LA FUNDAMENTO.

Presejoj, kiuj ne posedas la supersignitajn literojn, povas anstatau ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, kaj u. Ni tion faras en chi tiu numero de "La Suda Kruco."

:o:

—Kiel oui sidnas?—demandis shajne serioza kongresano.

—Sidnas? Pardonu, mi ne konas la vorton.

—Jes, sidnas; kompreneble la loko, kie oni sidnas, estas Sidnejo, sed kion sig. . .

Li ne finis; lian frivolecon trafis rapida kaj morta puno.

---

Sinjoro H. A. N. Williams che E. Williams, 61 Enmore Rd., Marrickville, Sydney, Australia. deziras korespondadi kun chiulandaj samideanoj.


# Cole's Book Arcade, Melbourne

**Two Million Books and Pieces of Music.**

**Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books. Free to You.**


Chandler-Lee Printing Service, 19-21 Bourke Street, Melbourne.